# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 10/11/2022 Sescentoka eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 682,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **300,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **153,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **138,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018

Nun studas **92,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



Donas bonan ĉirkaŭ-5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

**KAFO POVUS PROTEKTI KONTRAŬ KOVIM-19**

17-A DE NOVEMBRO 2022

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn.

*Roger Springer*



# Skribu pri via klubo



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ DE LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). N.ro 11 de "Por Komencantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ**: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kio estas la gramatika objekto en la suborda frazo en "Mi bedaŭras ke li manĝis la tutan torton"?

2). En La kombinita propozicio (=frazo) "Li manĝis, tio estas 'Li manĝaĉis', la tutan torton" ĉu "tio estas 'li manĝaĉis" estas subfrazo aŭ parto de la tuta kombinita frazo?

3). En "Li ĉiam estis fidela amiko',

a). kio estas la gramatika nomo de la parto fidela amiko"?

b). Kaj kio estas la parto "estis fidela amiko"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 608.

*Marcel Leereveld*

**3ZZZ** En la elsendo de la 7a de novembro Margaret Zaleski-Zamenhof klarigas kiel ĉesi fumadon .Krom tio vi trovos plurajn rimedojn por plibonigi vian sanstaton





**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1).La tutan torton.

2). Ambaŭ (subfrazo + parto de la tuta kombinita frazo).

3). a). Predikativo.

b). Predikato

*Marcel Leereveld*.

EN 1950 la CIA kreis la vorton "Konspiro" por misfamigi ajnan personon kiu provis malkaŝi ties sekretajn negocojn. Oni malkovris ke uzi la vorton "konspiro" estas kvieta kaj efika kontraŭ la kredo de vera informo.

# La politiko de la mondo ŝanĝiĝas

http://thesaker.is https://www.greanvillepost.com/

http://www.globaltimes.cn/index.html https://sputniknews.com/

Mi ne enmetas ligojn al la kapitalista mondo ĉar la ĉiutaga medio bone informas vin pri tio.

*Roger Springer*

# Pensoj pri mia vivo

Bob Felby



Ekde kiam mi naŝkiĝis mi aŭdis de miaj gepatroj, geinstruistoj, genajbaroj kaj radioparolantoj pri iu sencerbulo, je la nomo Adolf Hitler.

Laŭ tio, kion mi aŭdis, li estis reenkarniĝo de la Diablo, Satano!

Li ne estis germano, sed bedaŭrinde li ial deziris, eĉ deziregis esti germano, kaj ne nur ordinara germano, sed figvidantaĉo de la bonega kaj amikema germana popolo.

Kompreneble la germana popolo tute ne amis lin. La germanoj estas, same kiel ĉiuj el ni, ordinaraj kaj bonaj homoj. Ili, same kiel ni, laboras por tro malmulte da mono, kaj provas obei la leĝojn, da kiuj verŝajne estas tro multaj.

Hitler certe ne estis ordinara homo. Pro iu mistera kaŭzo li decidis malami la hebreojn. Li do decidis, ke ĉiu hebreo en la tuta mondo, devas esti mortigata. La ordinaraj germanoj vomis pensante pri tio, sed, kiel en ĉiuj landoj, ankaŭ en Germanujo troviĝis certa speco de junuloj, kiuj fiŝategaĉis fimortigadaĉon, sed kompreneble fimortigadaĉo ne estis permesata en la tiama Germanujo.

Do, tial Hitler plaĉis, eĉ fiplaĉaĉis al la junularo, aŭ pli bone, al certa parto de la germana junularo. Hitler ĝojis kaj kreis, eĉ fikreaĉis la Nazian Partion al tiuj multege da kruelemuloj, eĉ fikreemulaĉoj, kiuj ek de tiam povis bati kaj torturi kaj mortigi aliajn homojn, kiuj neniam en siaj vivoj faris ion ajn malbonan.

Tiam ekokazis la hontinda 3-a mondmilito, aŭ multe pli bone, la fihontindaĉa 3-a fimondmilitaĉo.

Hitler fiĝojegis kaj sentis sin heroo, fakte li estis nur krimulo, fakte fikrimulaĉo. Se iu el vi scipovas legadi, vi eble iam legis en iu tre mondfama libro, ke neniu el ni rajtas mortigi. Sed, malgraŭ tio milionoj da hodiaŭaj homoj amegas mortigadon kaj kun ĝojo, eĉ fiĝojaĉo, fakte eĉ kun fiĝojegaĉo aliĝas al la fiarmeaĉoj kiuj senpage loĝas en ĉiuj landoj de la mondo je la elspezoj de la honesta laboristaro.

Eĉ hodiaŭ, multege da jaroj post la 3-a fimondmilitaĉo, milionoj da gepatroj konsilas siajn filojn aliĝi al la fimortigularaĉoj de siaj landoj. Ili ankoraŭ lernis nenion.

Same kiel Hitler, kiun ili ŝajne admiras, pardonu fiadmiraĉas, ili aliĝas al la fiarmeaĉoj, kiuj fifloraĉas en ĉiuj landoj.

Gepatroj ja parolas al siaj gefiloj pri la heroaĵoj faritaj de iliaj patroj, onkloj, kuzoj, najbaroj kaj eĉ avoj. Sed, kiel ĉiuj, kiuj konas la arton pensi, scias, mortigado estas nenio, pri kio oni rajtas esti fiera. Se oni fieras pro sia fimortigemaĉo oni devas simple honti, eĉ hontadi!

Sed, ĉu tiu ĉi mia eduka artikolo helpas iom al mondpaco? Tute ne! Ni ĉiuj jam vidis, kvankam Hitler jam elkarniĝis, ke li ankaŭ jam reenkarniĝis en unu el siaj malamataj landoj, Rusujo, ĉu ne? Kaj nun ne la judoj, sed la ukrainuloj devas suferi kvankam neniu el ili iam ajn ofendis iun ajn! Via amiko, *Bob Felby*


Kara Bob, Mi opinias ke la kapitala sistemo nun atingas la finon de sia vivo. Sed kiel mi, ordinara homo, povus scii la veron kiam la novaĵoj de ambaŭ flankoj estas tute malaj? *Roger S*

# Kial la milito en Ukainujo estas grava

## La milito inter la Nova Ekonomia Sistemo kaj la nuna Tutmonda Kapitalismo

la 25-an de septembro 2022 Prof Wolff klarigas kie la ekonomia modelo de Ĉinio sidas historie: nova eksperimento en ilia versio de "socialismo kun ĉinaj trajtoj" kiu similas kombinaĵon de privata kaj ŝtata kapitalismo. Kien ni iros poste? "Nenie ekzistas grava ekonomia sektoro, en kiu la laboristoj demokratie posedas kaj administras siajn proprajn entreprenojn. Tion, diris Marx, estas kien la sistemo iros post kapitalismo. Tio estas la afero por la venonta sistemo. Ni ankoraŭ ne estas en tiu punkto. Ni estas ĉe la forvelkado de la dikotomioj inter privata kaj ŝtata kapitalismo kiuj estis la historio de Usono kontraŭ Sovetunio de la 20-a jarcento. Tiuj estis anstataŭitaj de la kombinaĵo administrita de la partio kiu estas la ĉina rezolucio de la tezo de privata kapitalismo, la kontraŭtezo de ŝtatkapitalismo kaj la sintezo, kiun la ĉinoj nun montris al ni, estas la bileto por esti la venonta, kaj verŝajne la lasta, imperio, kiun kapitalismo povos produkti." - Rikardo Wolff Ĉi tio estas klipo de la Tutmonda Kapitalisma Prelego de septembro 2022: Ĉinio kontraŭ Usono - Sistemo Leviĝo kontraŭ Falado Vi povas spekti la plenan prelegon ĉi tie: https://www.democracyatwork.info/glob... Aŭ aŭskultu ĝin kiel podkaston sur via plej ŝatata podkastludilo!

https://state capital combination.be/Av_J87Ia0W




Kaj tiel plu

Ekkonu la bazan kialon por la nuna milito inter Usono kaj Rusio.